

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3.00 == germ. markoj 3.50 ==
frankoj 4.25 == rejsoj 800 == rubloj 1.50.

Pago por anoncoj:

15 öre == 15 pfenigoj == 20 centimoj ==
8 kopekoj == por duonpaga petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige. (Svedujo.)*

Uppsala.

Decembro 1896.

N:o 12.

Al esperantistoj.

En la fino de la jaro 1887 eliris en la mondon la unua broŝuro pri la lingvo Esperanto: tio ĉi estis la rusa lernolibro de l' lingvo kun malgranda vortareto.

En la nuna jaro pasos sekve 10 jaroj de la momento, kiam nia lingvo aperis en la mondon.

Mi ne dubas, ke la esperantistoj volos iamaniere noti la unuan dekjaron de ekzistado de ilia lingvo, por kiu ili tiom multe laboris kaj kiun ili tiom multe amas. Kredeble ili volos noti tion ĉi per io agrabla al la kreinto de l' lingvo kaj utila al la lingvon mem.

Al la kreinto de l' Esperanto estas agrabla ĉio, kio estas utila al la lingvo.

Kion do bezonas la lingvo? Sendube tre multon, sed antaŭ ĉio *bonajn lernolibrojn kaj vortarojn en diversaj lingvoj.*

Tion ĉi la lingvo bezonas precipe nun, kiam al nia afero aliĝas novaj landoj. En multaj lingvoj ni tute ne havas lernolibrojn, por kelkaj nacioj ni havas nur malgrandajn vortaretojn, por kelkaj lernolibrojn, plenajn de eraroj. Tio ĉi terure malhelpas al la vastiĝo de Esperanto.

Tial mi proponas *fondi specialan kapitalon por eldonadi lernolibrojn kaj vortarojn en diversaj lingvoj kaj nomi tiun ĉi kapitalon "kapitalo de d-ro Zamenhof."*

Mi pensas, ke tio ĉi estos la plej bona kaj utila maniero festeni la dekjaran jubileon de nia lingvo.

Eble oni rediros, ke ni havas la eblon eldonadi lernolibrojn kaj vortarojn, presante ilin en la Biblioteko.

Jes. Sed ni memoru, ke la Bibliotekon abonas personoj de *diversaj* nacioj, kaj la naciaj lernolibroj kaj vortaroj estas utilaj ĉiu por *unu* nacio. Presante ekz. hispanan vortaron en la Biblioteko, la eldonantoj de l' Biblioteko kvazaŭ *perforte* devigos ĉiujn abonantojn de la Biblioteko aĉeti ĝin kaj efektive

bezonas tiun ĉi vortaron ne pli ol 0,1 aŭ eĉ 0,01 da ĉiuj abonantoj; kaj se la eldonantoj de l' **Biblioteko komencus** tre ofte ~~disendadi~~ vortarojn kaj lernolibrojn, ili kredeble baldaŭ perdos ĉiujn abonantojn.

Eble oni rediros ankaŭ, ke la esperantistoj estas malriĉaj kaj ne povos kolekti la sumon, kiu sufiĉus por la montrita celo.

Vere, la esperantistoj ne estas riĉaj, sed la kapitalo kolektota ne bezonas esti granda: la lernolibroj, la vortaroj — tio ĉi estas la libroj, kiuj vendiĝas la plej bone kaj ordinare postulas kelkajn eldonojn. Sekve se ni kolektos nur 500—700 frankojn, ni jam povas komenci la eldonadon. Ni eldonos tiam 2 librojn kaj poste atendos ĝis ili estos venditaj. Kredeble dum estos vendataj la unuaj eldonitaj libroj, kolektiĝos ankaŭ ankoraŭ iom da oferata mono, kaj tio plirapidigos la eldonadon de l' sekvantaj libroj. La diferenco inter kapitalo granda kaj malgranda estos nur en tio, ke la granda kapitalo donas la eblon eldonadi librojn pli baldaŭ unu post la alia, la malgranda — pli malrapide.

La "kapitalo de Zamenhof" neniam perdiĝos, kontraŭe, — ĝi ĉiam kreskos. Ĝi ekzistos en formo de mono kaj en formo de libroj.

Se al la esperantistoj plaĉos mia propono, tiam ni devos kredeble elekti ian personon, kiu kolektus la monon kaj gvidus ĝian uzadon.

Por ne perdi vane la tempon, mi petas ĉiun, kiu konsentas mian proponon, skribi al mi, kiun el la esperantistoj li elektas por gvidi la entreprenon kaj kian sumon da mono li povas oferi. Laŭ la nombro da ricevitaj leteroj mi vidos, ĉu mia propono estas akceptita aŭ ne, kaj eĉ povos difini proksimume la sumon oferotan. Pri la rezultatoj mi anoncos en "Lingvo Internacia" kaj nomos la personon, kiu estos proponita kiel gvidanto de la afero per la plimulto da voĉoj. Se tiu ĉi persono konsentos gvidi la aferon, oni sendos al li la monon. Mi petas nur ne elekti min, ĉar mi jam nun havas multegon da esperantista laboro.

Mi petas ankaŭ niajn amikojn *ne perdi la tempon* kaj skribi al mi *kiel eble plej baldaŭ*, ĉar se mia propono ne estos akceptita, ni devos havi la tempon por pripensi ion alian.

V. Gernet.

Rusujo, Odessa, Puŝkinskaja, 44.

Al tiu ĉi propono de nia amiko kaj kunlaboranto ni donas nian plenan aprobon kaj petas ĉiujn niajn legantojn laŭforte subteni ĝin, en la konvinko ke estos inter la plej efikaj rimedoj por nia propagandado kaj samtempe donos al la estimata aŭtoro de nia lingvo pli da plezuro ol ia ajn donaco. — Nur rilate la proponon de s-ro Gernet meti la kolektota mono sub la administrado de unu certa elektota persono ni ne konsentas, sed riskas proponi ke la estimataj oferontoj volu konfidi la administradon de tiu ĉi kapitalo nur al la s-roj *Eldonantoj de la "Biblioteko"* (vidu en n-ro 10—11, paĝo 190); ŝajnas ke tio ĉi donus pli bonan fundamenton por la ĝusta administrado, ĉar se *unu* persono havus tiun ĉi komision, danĝero estus ke ia malagrablo okazus (ekzemple se li subite mortus k. c.) Tiela aranĝado ankaŭ donus eblecon de komuna agado de la "Biblioteko" kaj la "Kapitalo de d-ro Zamenhof".

La red.

Novajoj.

Biblioteko.

--- Eldonantoj de la Biblioteko fariĝis ankoraŭ sekvantaj personoj: s-rino *E. Mankovskaja* el Kremeneĉ, Rusujo (10 rubl. ĉiujare); s-ro *René Lemaire* el Epernay, Francujo (50 fr. ĉiujare); s-ro *L. de Beaufront* el Epernay, Francujo (50 fr. ĉiujare); s-ro *V. N. Devjatnin* el Ĝedrojci, Rusujo (10 rubl. ĉiujare); s-rino *A. V. Prohoroviĉ-Koĉmarenko* el Varsovio, Rusujo (20 rubl. ĉiujare).

Oferado kaj propagando.

--- Por eldoni la tradukon de l' Biblio s-ro Ŝatimovski oferis 1 rublon.
 --- Por efektiviĝi la proponon de s-ro Kazi-Girej (N:o 4 de "L. I.", p. 56) s-ro V. L. Kravcov oferis 4 rublojn.
 --- Por la Biblioteko s-ro V. N. Devjatnin oferis 2 r. 20 k.

Novaj eldonoj.

--- S-ro V. N. Devjatnin sciigas nin, ke li intencas en la sekvanta jaro eldoni plenan kolekton de siaj verkoj originalaj kaj tradukaj. Se tiu ĉi intenco efektiviĝos, ni havos *la unuan plenan verkaron de l' esperantista cerkisto*. Por eldoni la verkaron (en du aŭ tri libroj) s-ro Devjatnin bezonas ian sumon da mono; tial li proponas, ke la esperantistoj abonu nun lian libron, sendante aŭ promesante sendi kion ĉiu povas kaj volas. La kosto de la verkaro ne povas nun esti precize difinita, - kredeble ĝi estos ne pli ol 3-4 frankoj. La adreso de s-ro Devjatnin estas: *Rusujo, Ĝedrojci* (gub. de Vilno).

--- S-ro *A. B. de Brzostowski* (Aŭstrujo-Hungarujo, Lemberg, str. Zamojski, 9) entreprenis verki kaj eldoni *la plej detalan bibliografion de Esperanto* por la unua dekjaro de ĝia ekzistado, sub la titolo: "*Unua objekta bibliografio de la literaturo esperanta, por unua dekjaro (1887—1897). — Katalogo de la cerkoj kaj artikoloj pri la lingvo au en la lingvo internacia Esperanto, kiuj eliris de la fino de l' jaro 1887 ĝis la fino de l' jaro 1897.*" Tiu ĉi grava kaj oportuna por la esperantistoj verko eliros en la komenco de l' jaro 1898. Por ke la verko estu eble plej plena kaj detala, s-ro Brzostowski bezonas po unu ekzemplero de ĉiuj esperantaj verkoj, prospektoj, anoncoj, kovertoj, prezaroj, gazetaj artikoloj pri nia lingvo k. t. p. Ni ne dubas, ke s-roj eldonintoj de tiuj ĉi pecoj rapidos sendi al s-ro Brzostowski po unu ekzemplero da ili, por ke li povu noti ĉion en lia bibliografio.


--- S-ro *Nylén* en Uppsala, kiu verkis la lastan bonegan lernolibron de nia lingvo por svedoj (vidu en n-ro 5 de L. I., 78) nun sin okupas per pretigado de nova eldono de la *vortaro esperanto-sveda*. La ĝismuna vortaro, eldonita siatempe de s-ro Jönsson, nun ne estas plu ricevebla kaj tial la Klubo Esperantista en Uppsala decidis eldoni la verkon de s-ro Nylén, kiam ĝi estos preta. La libro kredeble eliros en februaro — sciigo kiu certe estos agrabila por la multaj svedaj amikoj de nia lingvo.

--- En la n-ro 6—7 de nia gazeto p. 128, niaj legantoj trovis unu "*Kanto al la jago de paco*" kun la rimarko, ke por tiu kanto estas verkita bela muziko de s-ro *C. Adelsköld* en Stockholmo. S-ro Adelsköld, kiu estas konata inter la amikoj de nia lingvo kiel la aŭtoro de l' muziko por nia "Himno",

nun decidis eldoni la nomatan sian verkon kun la esperantaj vortoj kaj donaci tiun ĉi eldonajon al la Klubo Esperantista en Uppsala, kies honora membro li jam antaŭ longe estas.

Pri la lingvo Esperanto parolis, inter aliaj, la granda pola gazeto Kurjer Warszawski. En la nro 278, 1896 oni legas artikolon *Drozwani turecki*, subsignita de *Joz. Was.*, pseŭdonimo bone konata de niaj legantoj. Kelkaj vortoj, kiuj antaŭiras la artikolon sciigas, ke ĝi estas tradukaĵo el Esperanto, de la rakonto *Ĉe Ahmed Paŝa*, la granda pentristo, de *V. Langlet*, en la nro 5, 1896 de *L. I.* — Komprenoble ni deziras, ke eble plej multaj inter la artikoloj de nia gazeto estos tradukataj por naciaj gazetoj, kaj ni kredigas niajn legantojn, ke estas efektive bona rimedo por propagando. Ni petas ĉiun, kiu tradukas ion el nia gazeto alsendi al ni po unu ekz. de sia tradukaĵo.

Aliĝis al nia afero s-ro Toksvig, redaktoro de Nykjöbings Venstreblad (Nykjöbing, Danujo) kiu ankaŭ en sia gazeto skribis pri nia lingvo; sed mankas al ni materialo por povi raporti al niaj legantoj pri tiuj artikoloj.



Portugalaj popolaj kantetoj. *)

V.

Jam mi volis, vi ne volis,
Pensis indi pli ol mi;
Nun vi volas, mi ne volas,
Estas kaprica pro vi.

VI.

Amo per amo sin pagas
Kaj vi amon ne redonas:
Sed kiu malbone pagas,
Tian Dio ne pardonas.


VII.

Ĉe ĉi infanoj malgrandetaj
Estas necese kantadi:
Tial la patrino kantas,
Se eĉ ŝi volus ploradi!

VIII.

Ke la ĉagrenoj mortigas,
Erare ja pensas vi;
Se ili mortigus vere,
Jam estus mortinta mi.

Tradukis Albano de Magalhães.



Skizoj gramatikaj.

4. Verbigo de adjektivoj per la sufikso — i.

La lingvoj angla, franca, germana kaj rusa havas nombron da verboj, formitaj el adjektivoj. Por formi tiajn verbojn, la angloj agas tute simple: ili metas antaŭ la adjektivo la vorteton *to*: *pale* = pala, *to pale* = paliĝi; *mature* = matura, *to mature* = maturiĝi kaj maturigi; *equal* = egala, *to equal* — egaligi; iafoje la vorto prenas la finiĝon *en*: *red* = ruĝa, *to redder* = ruĝiĝi kaj ruĝigi; *ripe* = matura, *to ripen* = maturiĝi kaj maturigi. Kelkfoje, se la adj. transformiĝas en verbon de returnaganta formo, la angloj almetas al la adjektivo la returnagantan pronomon *one's self* = sin: *proud* = fiera, *to proud one's self* = montri sin fiera, esti ĉera (litere: fari sin fiera); *content* — kontenta,

*) Vidu la N:o 5 de "I. L.", paĝon 97-an.

to content one's self — esti (fari sin) kontenta. Cetere la angloj ankaŭ uzas la formon: *to be furious* = esti furioza, *to be proud* = esti fiera.

Tiel same vortfaradas la francoj: *blanc, blanche* — blanka, *blanchir* = esti blanka, blankiĝi, blankigi (ili uzas ankaŭ la verbon *se blanchir* = fariĝi blanka). Ofte la adj. prenas iajn afiksojn aŭ sufiksojn: *sourd* — surda, *s'assourdir* — surdiĝi: *égal* = egala, *égaliser* = egaligi.

La germanoj uzas preskaŭ tiujn samajn perojn: *karg* — avara, *kargen* = esti avara; *stolz* = fiera, *stolziren* = esti fiera; *gleich* = egala, *gleichen* = esti egala kaj egaligi: *blind* = blinda, *blenden* = blindigi: *schwarz* — nigra, *schwärzen* = nigrigi.

Tiel same la rusoj: *bezumnij* = freneza, *bezumstrovat* = esti freneza, *obezumet* = freneziĝi: *gordij* = fiera, *gorditsja* = esti (montri sin) fiera: *skupoj* = avara, *skupitsja* = esti avara: *skromnij* = modesta, *skromniĉat* = esti (montri sin) modesta; *hrabrij* = kuraĝa, *hrabritsja* = montri sin kuraĝa.

El tio ĉi sekvas, ke la verboj de la pridirata speco ofte havas du aŭ eĉ tri signifojn: signifon de rekta ago, de returnago kaj de stato: ekz. el la adjektivo *black* = *noir* = *schwarz* = *ĉernij* = *nigra* formiĝas: 1) *to blacken* = *noircir* = *schwärzen* = *ĉernit* = nigrigi, 2) *to blacken* = *noircir* = *schwarz werden* = *poĉernet* = nigrigi (transformiĝo el unu stato en alian), 3) *to blacken* = *noircir* (— être, paraître noir) = *schwarz sein* (*schwarz scheinen*) = *ĉernet* = esti (montri sin) nigra.

Rimarko. — Ne ĉiuj adjektivoj de neartaj lingvoj povas verbiĝi: multfoje la responda verbo anstaŭiĝas per la helpanta verbo kaj adjektivo: la germanan verbon *kargen* (esti avara), kiun la rusoj ankaŭ tradukas per unu vorto *skupitsja*, la angloj kaj francoj tradukas duvorte: être avare.

Nun ni konformigos la diriton al la esperantaj adjektivoj.

La aganta verbo, formita de adj., montras transformigon el unu stato en alian; por esprimi tion ĉi, ni havas la sufikson *ig*: *nigrigi* = fari ion nigra; la returnaganta formo estas esprimata dumaniere: *nigrigi* kaj *nigrigi sin**); sekve por la stata formo estas nur unu sola esprimo: *nigri* = esti (montri sin) nigra.**)

El la dirito sekvas ke la adjektivoj: aroganta, avida, brava, diligenta, fidela, fiera, falsa, feliĉa, furioza k. t. p. povas fariĝi verboj *stataj*: aroganti, avidi, bravi, diligenti k. t. p.

Rimarko. — La formo "blanki" donas la substantivon "blankado", kiu montras daŭrantan staton kaj estas facile diferencebla de aliaj substantivoj, venantaj el la sama adjektiva radiko.

Ekzemploj. — Inter ĉiuj blankaĵoj de mondo la blanko de ŝia vizaĝo estas la plej delikata, sed tio ĉi ne pravas blankecon de ŝia animo, ĉar blankado de vizaĝo povas ja esti rezultato de blankigado per blankilo.

Kion vi kapablas? Mi pretas agrabli al vi. Por verdi estas bezono pli frue verdiĝi. La verdado kaj poste la flavado de kampoj estas ĉarmaj por la

*) Ĝis nun la esperantistoj ankoraŭ ne klarigis la diferencon inter la formoj: *nigrigi* kaj *nigrigi sin*. La provo fari tiun ĉi diferencon trovas sin en "Vollständige Methodische Grammatik der Internationalen Sprache Esperanto" de L. Meier, München. 1891, p. 58. S-ro Meier konsilas uzi la sufikson "iĝ" por la returnagantaj verboj, kiuj montras la agadon, ne dependantan de la persona volo — kaj la formon pronoman por tiuj verboj, kiuj montras agadon, dependantan de la volo de l' aganta persono.

***) La formo "nigri sin" ŝajnas ne havi sencon, ĉar tiu ĉi verbo devus signifi: esti sin nigra.

okuloj de vilaĝano. Kiu malsobras, tiu malsaĝas. Kiu miopas, tiu necesas (bezonas) okulvitrojn. Li edziniĝis kun sia amatino kaj nun feliĉegas. Io blanketas*) en la malproksimo. Lamado utilas al neniu. Kiu malĉestas, tiu estas malĉestanto. Li indiferentas miajn konsilojn. Kiu fieras, tiu ofte blindas. Tiu ĉi monto altas du kilometrojn, sed larĝas multipli. La monto tiel krutas, ke ni ne povas sur-rampi. Tiu ĉi arbo izolas (solas) sur la ebenajo. La faritaĵoj de Dio perfektas. La ideoj pri "patro" kaj "infano" reciprokas: sen "patro" ne estas "infano" kaj kontraŭe. La vazo plenas: enverŝu ankoraŭ unu guton, kaj ĝi derandiĝos. La arbaro densas. Kio ĝustas, tio ĝustatempas. Via propono ne oportunas al mi. Ĉu oni povas seriozi, aŭdante tian paroladon? Vi ion kaŝas de mi: vi ne sinceras. Li vanas, ĉar liaj penadoj kondukos al nenio. La leĝoj de Ĥ naturo konstantas. La kampo ebenas ĝis la rivero, sed transe la lasta ĝi deklinas. Lia voĉo mallaŭtas kaj raŭkas. Malfeliĉo oftas, feliĉo maloftas. Li diversas (malsimilas) je ŝi, kiel la tero je la ĉielo. Kio efektivas, tio eblas, sed ne kontraŭe. Miaj lipoj sekas, mia koro plenas je ĉagrenoj, mia animo ekstrema (superflua) je kolero. Tio ĉi ne sulfias por ke mi kontentu. Nutraĵo, kiu malfreŝas, malutilas al sano. Kio subitas, tio estas subitaĵo. Vi ĉiam kontraŭdiras kaj spitas. Pli frue li estis generalo, nun li privatas. La tuta afero detalas nun antaŭ miaj okuloj. La korpo putras, la animo eternas. Ĉu vi pensas ke tiu laboro facilas al mi? Li forlasis nian rondeton kaj apartas de ĝi. Kiu unuis, tiu lastos; kiu lastis, sin unuos. Glaso rompemas, kaŭĉuko elastas. Multa ridado propras al malsaĝulo. Mi pagas al vi la ŝuldon, ni kvitas. La tempo malfruas (= estas malfrua), ni ne povas nun iri al li. Kio oftas, tio ordinaras. Lia koro krudas ĝis krueleco. Viaj vortoj dolĉas, viaj agoj akras.

A. Kofman.



Vivo Internacia.

La grandaj premioj de A. Nobel.

Kredinde miaj legantoj jam scias, ke la sveda riĉulo Alfred Nobel, kiu mortis en dec. 1896, faris en sia testamento grandajn dispoziciojn por scienca celo. Sed ĉar eble malĝustaj aŭ malsufiĉaj sciigoj estas donataj de kelkaj gazetoj pri tiu ĉi fakto, ni permesas al ni doni al miaj legantoj la laŭvortan tradukon. La unua parto de la testamento difinas kelkajn sumojn (ĉirkaŭ 3 milion. frankojn) al parencoj kaj amikoj. Poste estas legata:

"Pri mia tuta resta havaĵo estos tiel aranĝata: de la kapitalo, kiun la administrantoj konvertos en certaj paperoj, estos farita unu fono, kies ^o/_o ĉiujare estos donata kiel premio al tiuj, kiuj dum la pasinta jaro faris al la homaro la plej grandan utilon. La ^o/_o estos dividata en kvin egale grandaj partoj, kiuj estos donitaj: unu al tiu, kiu en la *fiziko* faris la plej gravan

* La verbo "blanketi" havas tute difinan senceon. Se ia objekto vidata de malproksime, havas ne tre klaran koloron, sed ia koloro tamen regas pli ol ĉia alia, tiam ni uzas la et-verbon: ruĝeti, blanketi, nigreti k. t. p. Se ni diras "sur la maro blankas velo", ni komprenigus ke la velo (de la ŝipo) estas sufiĉe proksima, kaj ni povas ĝin vidi tute klare. La francoj ankaŭ esprimas tiun ĉi ideon tute precize, ekz. ili diras: "cela tire sur le rouge" (tio ĉi havas ruĝan nuancon: ruĝetas).

eltrovon aŭ eltrovaĵon: *unu* al tiu kiu faris la plej gravan *ĥemian* eltrovon aŭ plibonigon: *unu* al tiu kiu en la regiono de *fiziologio* aŭ *medicino* faris la plej grandan eltrovon: *unu* al tiu kiu en la *literaturo* verkis la plej eminentan en ideala speco, kaj *unu* al tiu kiu plej multe aŭ plej bone efikis por la *fratiĝo de l' popoloj* kaj por *forigado aŭ mulpliigado de ĉiamaj armeoj* kaj por aranĝado aŭ vastigado de *kongresoj de paco*. — La premioj por fiziko kaj ĥemio estos eldonataj de la *Sveda Akademio de sciencoj*, por fiziologiaj aŭ medicinaj verkoj de la *Instituto Carolina* en Stockholm, por literaturo de la *Reĝa Sveda Akademio* en Stockholm, kaj por batalantoj de l' paco de unu komitato konsistanta el 5 personoj, kiujn elektas la *norvega "Storting"* (parlamento). — Estas mia decidita volo, ke ĉe la eldonado de l' premioj tute ne estos rigardata la aparteno al ia aŭ alia nacio, tiel ke ili ĉiam estos donataj al la plej inda, *li estu skandinavo aŭ ne.*"

— Ĝis nun oni ne povas certe diri kiom da mono reprezentas la kapitalo sed laŭ la sciigoj, kiujn oni povis ricevi, ĝi devas esti ĉirkaŭ *30 milionoj kronoj*. Tial ŝajne estos *disdonata ĉiujare ĉirkaŭ unu miliono kronoj* (1.500.000 frankoj) al kvin personoj t. e. *po 300.000 frankoj*, proksimume!

Bedaŭrinde kelkaj punktoj en la testamento estas ion neklaraj, ekz. pri la administrado de la tuta kapitalo, kaj la vortoj "literaturo" kaj "ideala", kiuj povas esti interpretataj diference. Sed oni povas esperi ke la Sveda kaj Norvega ŝtatoj garantios la plenumadon de l' volo de l' mortinto kaj en konsento kun la hereduloj klarigos la malklaraĵojn.

Precipe ni volas turni la atenton de niaj legantoj al la faktoj: *1^e* ke la premioj estas *tute internaciaj*: la mortinto kiu akiris sian havaĵon en diversaj landoj volis ĝin redoni al la tuta mondo: al la patrolando do li donis la honorantan kaj karan devon disdoni ĝin: *2^e* ke la *kvina* premio estas de speciala intereso por ni esperantistoj. A. Nobel fervore interesiĝis por la paca demando kaj por la fratiĝado de l' popoloj kaj volis per unu kvinono de sia donaco doni al la laboro por tiu celo sian fortan helpon. Nia laboro do, ĉu ne estas la sama? Eble en unu jaro prosperos al ia Esperantisto gajni tiun-ĉi premion, kaj certe li tiam ne forgesos, ke la mono akirita estos por li ĉefe nur la granda rimedo por doni efikan helpon al la afero, al kiu li sin dediĉis. Sed en ĉia okazo, se la donaco de A. Nobel helpas al nia afero senpere aŭ ne, ni neniam forgesu ke lia malavara dono estas donaco al la homaro kaj donaco por celoj, parencaj al la nia.

"Voko sen revoko"

(vidu en n:o 10—11, p. 195).

Ni ricevis la sekvantan leteron de unu nia estimata kunlaboranto. La legantoj volu mem juĝi pri ĝia enhavo kaj alsendi al ni siajn opiniojn. Kiel diras efektive la skribinto, tiu ĉi propono tute ne konkuras kun tiu de s-ro O. W. Zeidlitz, al kiu ni donis nian plenan aprobon.

Por la Stockholma ekspozicio.


S-ro O. W. Zeidlitz proponis ke ni ion faru por Esperanto en la estonta ekspozicio en Stockholm. Mi tute konsentas kun la proponanto, sed ĉar mi dubas ke estos ebla por ni (pro manko de mono kaj — energio) aranĝi specialan esperantan ekspozicion, mi volas fari sekvantan proponon:

La redakcio de "Lingvo internacia" difinas en bona tempo certan tagon dum la ekspozicio kiam ĉiuj esperantistoj, estantaj en Stockholm, kunvenu al kolacio, kongreso, kunsido (laŭ komplezo). Pri tiu-ĉi kunveno estos sciigataj

la ĵurnalaj korespondantoj per plakato en la presara biroo aŭ alimaniere. Ni tiel ricevos grandan reklamon en tuta Eŭropo.

Mia propono, kiel oni vidas, ne konkuras kun tio de s-ro Zeidlitz. Konjektante, ke almenaŭ kelkaj dekoj da esperantistoj vizitos l' ekspozicion, mi kredas ke tia kunveno estus kaj agrabla por ili kaj bona por Esperanto.

Gustaf Siösteen.



"Birdoj migrantaj."

(El *E. J. Stagnelius*, glora sveda poeto.)

Al fremda la bordo
Ĝemanta birdar'
Vojaĝas de l' nordo
For super la mar'.
Kun vento disiras
Malgaje la kri':
"Ho kien nin tiras
L' ordono de Vi?"
Flugila l' ar' tiel vokadas al Di'.

"De landoj malriĉaj
Ni flugas kun tim',
Ĉar tie feliĉaj
Ni estis sen lim'.
Ni neston konstruis
En verda arbkrone,
Ĝin bele trabruis
Venteta la son'.
Ni flugas nun al malkonat'-region'.

La nokto somera
Kun rozoj en har'
Sidadis espera
En verda l' arbar'.
Ni ne endormiĝis
Dum nokta la hor',
Ni nur sensentiĝis
En flora l' odor'
Gis vekis nin sun' per radioj de or'.

Arkajon portadis
L' arbar' super ni.
Rosperloj bruladis
Sur flora foli'.

Sed nun ekflaviĝas
La bela arbar'.
La vent' plifortiĝas
Denove sur mar'.
Kovrita de prujn' estas kampa florar'.

Pro kio ni restas
En nordo plu nun?
Malhelaj jam estas
Radioj de l' sun'.
For estas somero,
El tomb' flugas ni
Sen plend' tra l' aero
Preĝantaj al Di'.
Vin, marojn bruantajn, salutas nun ni!"

Ĝin kantas birdaro
Ĉe l' bruo de ond'
Kaj venas trans maro
Al pli bela mond'.
Kaj tie sonoras
La bru' de l' river'
Eterne, kaj floras
Eterne la ter'.
La boskoj kantadas pri ĝu' kaj esper'.

Ho kiam eniĝas
En vivon dolor',
Kaj jam aŭtuniĝas,
Ne ploru, ho kor'.
Ne plendu la sorton,
Ĝi venas de Di'!
Ne timu la morton,
Land' kuŝas trans ĝi.
Lumita eterne de suna radi'!


Sig. Ag. . . .



Refortigo.

Mi forte ekflugos en malproksimecon,
Sufiĉe jam kanti nun nur malgajecon.
Pli baldaŭ revenu juneco kaj forto.
Forflugu premanta malĝojo de l' sorto.
Kaj sen rerigardo antaŭen, sen timo
Ekflugos rapide mi al malproksimo.

Seleznet.



El lingvo esta.

Juneco.

(El *Jakob Tamm.*)

Gajemaj infanoj ludadis
Sur mola herbaĵo de l' korto,
Mi ilin vidante ekĝemis
Pro rememoraĵoj pri sorto.
Serĉata feliĉo briletis
Al mi jam en malproksimeco;
Ĉu tio ĉi estis la tempo
De mia belega juneco?


Wilhelm Waher.

Lasta amo.

(El *K. E. Sööt.*)

De kiam mi estis lasita
De ĉiuj kaj sola mi staris,
De kiam mi trovis nenion
Por ami, ĉar ĉio min baris,
De tiam mi amas doloron
Restitan en brusto de amo...
Kaj ĉion al mi rememoro
Prezantas en drama junflamo.

Wilhelm Waher.



El Koreujo.

Koreano havas en si ion de aria gento kaj ion de mongola. Li memorigas la arianon per la blankeco de sia haŭto, per la formo de sia korpo, per la klara koloro de l' haroj. La mongolon li similas per la viveco de sia rigardo kaj per la elasteco de l' movoj. Koreano ne posedas grandan senton de honto kaj ŝtelas ĉion ĉe ĉiu kun trankvila konscienco. Tio ĉi memorigas pri unu anekdoto, aŭdita en Söul.

Unu el eŭropanoj, loĝantaj en Koreujo dum kelkaj jaroj, havis perfektan "kelon", t. e. bonajn drinkaĵojn en sia kelo. La servantistaro, kiu konsistis el koreanoj, tiel gustadis la enhavon de l' boteloj, ke post kelka tempo en la kelo restis nur... malplenaj boteloj. Tiu ĉi fakto klariĝis precize en la tago, kiam la eŭropano akceptis ĉe si unu el la plej influaj misiistoj, la patron O., kiu ĵus altiris al la kristana kredo ĉiujn servantistojn de l' eŭropano. — Mia patro — proponis la eŭropano, — kion ili eltrinkis en la kelo, tio ĉi jam ne renovos. Sed eble vi influus viajn ŝafetojn, ke ili redonu al mi la botelojn, kiujn ili ankaŭ prenis al si. — Sinjoro! — respondis la misiisto, — se mi farus hodiaŭ ion similan, mi morgaŭ ne havus eĉ unu altiriton...

La vojaĝanto, alvenanta Koreujon de l' flanko de la maro, atingas la tero en Ĉemulpo kaj venas al la bordo en loka ŝipeto, nomata *sanpans* (tri tabuloj). Sur la bordo leviĝas monteto, tie kaj ie kovrita per arbaretoj, kaj

la haveno estas malproksimita de la bordo je kelkaj centoj da metroj. El malproksimo blankas la domoj de eŭropanoj, per sia arkitekturo kaj grandeco distingigante de la koreaj domoj. De la monteto oni vidas Ĉemulpon, ĉirkaŭitan per malgrandaj insuletoj, kiuj kuŝas kiel larĝa zono laŭlonge la tuta bordo.

Sur la tero la eŭropano vojaĝas en transportebla seĝo, portata de koreanoj. Pakajon oni metas sur bovojn. Tiuj ĉi potencaj bestoj havas tian forton, ke ĉiu el ili portas sur si po 200 kilogramoj sen laĉigo. La portistoj kondukas la bestojn per ŝnuroj, alligitaj al la ringetoj, kiuj estas enmetitaj en truojn de l' nazego de la besto. La malgrandaj lokaj ĉevaloj, havantaj apenaŭ tri futojn de alteco kaj neniam subforĝitaj, ne taŭgas por vojaĝo laŭ la vojoj, erinacitaj per ŝtonoj. Longedaŭra balancado de l' seĝo sur la ŝultroj de l' portistoj faras la vojaĝon en Koreujo tre neplezura.

En la duono de l' distanco inter Ĉemulpo kaj Söul la vojo komencas leviĝi. En kelkaj lokoj la deklivo estas tiel kruta, ke la kondukantoj ĉirkaŭligas la hufojn de la bovoj, por ke ili ne falu malsupren. La ĉirkaŭaĵo estas dezerta kaj preskaŭ ne prilaborita, kvankam la tero estas fruktoporta. Ie kaj ie, apud bordoj de riveretoj, oni povas trovi kampetojn, semitajn per rizo. La maldiligenteco de koreanoj estas tiel granda, ke ili kun abomeno entreprenas ian laboron kaj en la tempo de malsato ili manĝas eĉ hundojn, vagantajn sur kampoj.

La koreanoj vestigas originale: ili portas larĝajn pantalonojn kun vasta surtuto. La harojn, kuintiritajn ĝis la supro de l'kapo, la koreano ligas sur la verto en specon de harligeto. Nur la viroj edzinigitaj portas kovrilon sur la kapo.

Al bona fono tie apartenas du demandoj, kiujn oni devas proponi al ĉiu renkontita sur vojo. La unua demando: "ĉu vi manĝis?" La respondo devas esti jesiganta, ĉar la neiganta respondo devigas la demandanton al la malplezuro preni el sia sako ian nutraĵon por ĝin doni al la malsatulo. La dua demando: "ĉu vi iras orienten aŭ okcidenten?" Post la respondo la irantoj tamen iras ĉiu sian flankon.

La ĉefurbo de Koreujo, Söul, vidata el malproksimo faras impreson de iaj grandegaj testudoj. La orelon de la vojaĝanto, kiu eniras en la urbon, frapas terura kakofonio farata per *tam-tam* kaj *gong'oj*, sed la koreanoj tamen staras pli supre, ol iliaj ĥinaj muzikaj instruistoj. Jen la sceno, kiun oni povas vidi en la korto de ia domo: apoginte sin kontraŭ la muroj de najbara domo, la muzikistoj kun fermitaj okuloj batas la instrumentojn, akompanante dancadon de virino, vestita en diverskoloraj vualoj. La dancistino tenas en unu mano la etenditan ventumilon, en alia mano — la bastoneton. Ŝi sin turnas en unu loko, mallarĝigante ĉiam pli la rondon. Ŝi estas "*mutan*", t. e. sorĉistino. En la domo kuŝas malsanulo kaj *mutan* elpelas la malbonan spiriton, troviĝantan en la korpo de l' malsanulo. Subite *mutan* haltigas kaj eldonas kriegon laŭtan, minacan, ordonantan. Venis la decida momento. La knaboj, kiuj atendis la ĝustan momenton, kaptas la faritan el pajlo kaj kaŝitan en ia anguleto de l' korto idolon, en kiun, laŭ la ordono de *mutan*, transiris jam la malbona spirito, kaj ĉe la surdigantaj sonoj de *tam-tam* ili trenas ĝin el la urbo, sur kampon, submetas fajron kaj bruligas, por ke la malbona spirito disventumiĝu kun la fumo.

Ne-koreano.



Pri la ortografo de l' propraj nomoj.

Nova respondo al la demando no 1 en *L. I.* no 8, p. 163.

Kiel oni devas skribi en esperanto la proprajn nomojn?

Tiu ĉi demando jam longe maltrankviligis tiujn, kiuj sin iam okupis pri geografio. Ĝia respondo dependas de kelkaj fundamentaj rimarkoj.

El unu lingvo al la alia, la nomoj estas distingataj laŭ la elparolo aŭ la ortografo.

La elparolo estas esence nacia. Tio signifas ke ĉia lingvo posedas sonojn, kiuj ne ekzistas en tiu aŭ tiu alia. Kaj, nature, la ortografo de ĉia lingvo estis farita por ĝia elparolo. Estas do tute neeble skribi fonetike la vortojn (aŭ nomojn) de ia lingvo, uzante la ortografon de ia alia. — Ekzemple, la sonoj francaj "Saint-Ouen" ne povas esti transskribataj germane aŭ ruse, nek estas eble skribi, kun elparolo franca aŭ esperanta, la anglan vorton "London".

Aliflanke, laŭ la literoj uzataj skribante, la lingvoj sin dividas en du klasoj. La unuaj estas skribataj per la alfabeto internacia, t. e. per la latina (aŭ la gotika, kiu estas efektive la sama: kaj oni povas aligi al tiu klaso la lingvon grekan, ĉar oni havas regulojn certajn por transskribi ĝiajn nomojn per literoj latinaj. — Esperanto uzas tiun ĉi internacian alfabeton.

Aliaj lingvoj, ekzemple la rusa, la araba, k. t. p. havas nacian alfabeton, enhavantan literojn kiuj taŭgas sole por sonoj naciaj.

* * *

Tiuj rimarkoj donas al ni la ŝlosilon de l' problemo.

Kion oni volas? Esti komprenata de ia alilandano aŭdanta au leganta. Sed esti komprenata de la aŭdanto estas plej ofte neeble: ĉar se ni ne konas lian lingvon, ni ne scias kiel elparoli ĝiajn sonojn. Tiam, se la aŭdanto ne komprenas, ni skribas la nomon, kaj ŝanĝas la aŭdanton en leganto.

Do, ni devas peni por esti certe komprenataj *de legantoj*, ĉar skribi estas nia lasta rimedo. Do, ni devas skribi la nomojn laŭ maniero ne konfuzonta la alilandanojn.

Tiu maniero ne povas esti alia ol la ortografo nacia. Ĉar ia transskribo, kiun oni nomas fonetika, produktas la plej bedaŭrindan malordon.

1:e) Oni konsideru la konfuzajojn kiujn produktas inter nomoj la homonimoj, t. e. sole malsimilaj dank' al la nacia ortografo. — Ekz., la francaj nomoj *Saint-Paul* kaj *Saint-Pol*, la riveroj *Loire* kaj *Loir*.

2:e) Por transkribi fonetike, bezone estas ke la skribanta konu la elparolon de la konsiderata lingvo, kio ne okazas ĉiam, aŭ ke li havu plene gan geografian nomaron esperantan, kio eble neniam ekzistos.

Jam nun kelkaj nomoj estas ofte skribataj bedaŭrinde, versimile tial, ke ilia bona elparolo ne estis konata de la elektintaj tiujn transskribojn.

Ekzemple, kial skribi Munĥen? La *ch* germana ne estas elparolata, en tiu ĉi nomo, kiel *h*, sed kiel dolĉa *ĉ*.

Kaj precipe, kial la *z* en *Parizo*? La nomo de nia ĉefurbo estas elparolata:

France: Pari (la akcento sur la lasta silabo);

Germane: Paris (sama rimarko):

Angle: Peris:

Itale: Parigi:

Ruse: Parij.

sed nenie, laŭ scio mia: Pariz!

Kaj iam okazas, ke la elparolo de l' nomo ne estas certa aŭ unuforma, en ĝia lando mem, pro iaj malsimilecoj de dialekto. Tiam, kiel oni ĝin transkribus? Ekz., la urbo Regensburg; iaj Germanoj elparolas *Regensburg*, iaj *Reŝensburŝ* (ŝ dolĉa), iaj *Rejensburg*...

3:e) Eĉ se oni venkas tiun malfacilecon, transkribo fonetika ne povas esti tute preciza. — Ekz., *Bordo* ne estas egala al la franca *Bordeaux*; tie ĉi la akcento estas sur la lasta silabo, kiu havas la sonon nomatan "o fermata", mallonge elparolatan, dum la unua o estas "malfermata".

4:e) Tia transkribo estus nekomprenebla por la kunlandanoj mem de la nomo, kaj tiel Esperanto ne donus al ni, kiel devas kaj promesas, la rimedon por *rojagi en la alilando*.

Ekzemple, kia franco ekkonus la nomojn Marsej (Marseille), Oser (Auxerre), Oriak (Aurillac), Kodbek (Caudebec), Ŝerbur (Cherbourg)? Kia Germano ekkonus Dojc (Deutz)?

Kaj, aŭdante, nek la Franco komprenus *Dojc*, nek la Germano komprenus *Oser*, se ili ne konas la rilatantan lingvon, — dum, legante, ambaŭ komprenus Deutz kaj Auxerre.

Tiuj argumentoj estas eble ankaŭ pli gravaj tuŝante la homajn nomojn, ol la geografiajn.

Ni konsideru, ekzemple, mian nomon, *Moch*. La rusa oficiro, tradukanta unu el miaj militaj verkoj, skribis mian nomon per la rusaj literoj kiuj faras la elparolon *Moŝ*. Nun, france, la nomo estas elparolata *Mok* (kiel la nomo Roch), kaj eble pli ol unu esperantisto ne scias tion.

Tiu ŝanĝo estis al mi tre malagrabila. Sed ne malpli malplaĉanta estus la transskribo *Mok*. Ĉar tie mi havas multajn homonimojn, skribatajn france *Mock*, *Mocq*, kaj *Moque*, ne parlante pri similaj nomoj, kiel *Mook*, *Moog*, kiuj ankaŭ ekzistas, aŭ pri la nomo *Moche*, kiu estas elparolata *Moŝ*. Nun, la strangeco de tiuj multaj ortografoj havas la utilecon malkonfuzi nin.

Kaj mia antaŭnomo *Gaston* estas tute neelparolebla en Esperanto: kiel oni ĝin fonetikus?

Tio ne estas aparta okazo: miloj da homoj protestus same, se oni ŝanĝus la figuron de ilia patra nomo. La nomo de ia homo estas lia bieno la plej aparta — ofte la sola — lia signo distinganta, kaj neniu havas la rajton tuŝi ĝin kaprice.

* * *

Sed ni vidis, ke ekzistas lingvoj kun naciaj alfabetoj, tio estas kun literoj inter kiuj iaj taŭgas sole por naciaj sonoj.

Ĉar oni ne povas uzi, en la lingvo internacia, tiujn alfabetojn nekonatajn de la alilandanoj, necese estas transskribi la nomojn per literoj internaciaj. Sed ne ekzistas, por ĉia litero aŭ sono de tiuj lingvoj, litero aŭ sono internacia egaltaŭganta. Ne estas do eble fari alie, en tiu okazo, ol transporti la nomojn, kiel pli bone, fonetike, elektante la sonojn la plej proksimajn al la naciaj. Al la nepoveblo neniu estas devigata!

Sed tio devas esti farata tre zorge, kaj sole de la kunlandanoj de l' nomo, kiuj estas la solaj ebluloj por doni korektan transskribon. — Ekzemple, ia Ruso povas sole diri al ni, ĉu ni devas skribi *Suvalor* aŭ *Suvalof*, kaj *Tolstoi* aŭ *Talstoj*.

Oni atingos tiel, sendube strangajn rezultatojn. Ekzemple, la nomo de l' d-ro Zamenhof devenas certe el la lingvo germana; tie estis skribata *Samenhof*, kaj elparolata Zamenhof de la Nordgermanoj, kaj Samenhof de la Sudgermanoj. Ĝi sendube estis portata en Rusujon de ia sin rusiganta Nordgermano, kaj estis transskribata ruse kun la litero *z*. Nun, ni devas skribi ĝin esperante *Zamenhof*, kiel faras la doktoro mem, ĉar tio estas la transkribo fonetika de la rusigata nomo, t. e. de la vera nuna nomo. Sed, se la doktoro havas ankaŭ germanajn parencojn, ilia nomo devas esti skribita Samenhof, per la samaj literoj kiel germane, kaj la germana leganto elparolos ĝin per *z* aŭ *s*, laŭ sia aparta dialekto.

Tiu okazo, de nomo iam alilandigita, estas tre aparta, kaj kompreneble estas ke ĝi kondukas al apartaj rezultoj. Sed, por la plej multaj okazoj, mi kredas ke oni ne povas proponi regulon pli konvenantan ol tiu: *“skribi ĉiam propran nomon kun la nacia ortografio, escepte la nomojn por kiuj ĝi estus ueble.”*

* • *

Sed mi kredas ke oni devus escepti ankaŭ kelkajn nomojn kiuj estas efektive internaciaj, kiel la nomoj de kontinentoj, landoj, maroj, kaj de montoj, riveroj aŭ lagoj, tuŝantaj kelkajn landojn en kiaj ili ricevis nomojn malsimilajn.

Tiuj nomoj ne estas tre multaj, kaj estos facile kunigi ilian plenan aron, kiu devus esti aligata al ĉia vortaro esperanta.

* * *

La nomoj ne ekzistantaj en tiu nomaro devus esti skribataj laŭ la ideoj supre elvolvitaj.

Sed ni rimarku ankaŭ ke la finaĵo *o* senutile malformus tiujn nomojn, kaj ne devas esti almetata al ili. Ĉar ĝia rolo estas tiu de signo de la substantivoj: nun, ĉiu scias ke la nomoj propraj estas ĉiam substantivoj, kaj ilia esenco estas sufiĉe montrata per ilia granda komenclitero.

Ia dubo sole povas ekzisti kiam la nomo komencas la paroladon, ĉar tie estas ĉiam granda komenclitero, kiu ajn estas la esenco de l' unua vorto. Por tiu okazo, oni povas aligi al la nomo apostrofon (') tenantan la lokon de *o*. — Ekzemple: “Paris' estas la ĉefurbo de Francujo.”

La litero *n*, signanta la celon de ia movo, estas tre utila. Mi proponas uzi ĝin, kun antaŭiranta apostrofo. — Ekz.: “Mi iras Paris'n, aŭ London'n, aŭ Odesa'n”.

* * *

Mallonge, ni estas kondukataj al la sekvantaj reguloj.

A. Nomoj internaciaj.

La nomoj de kontinentoj, de maroj, de landoj kaj de montoj, riveroj aŭ lagoj tuŝantaj kelkajn landojn, estas internaciaj, kaj havos nomojn internaciajn, kun regulaj finaĵoj.

B. Nomoj naciaj.

1:e) *Nomoj devenantaj el lingvoj skribataj per alfabetoj naciaj.*

Tiuj ĉi estas transskribataj, kiom eble, fonetike.

La reguloj fundamentaj por tiaj transskriboj devas esti decidataj de la kunlandanoj de l' konsiderata loko aŭ persono.

2:e) *Nomoj el lingvoj skribataj per alfabeto internacia.*

Tiuj ĉi estas ĉiam skribataj laŭ la nacia ortografo.

En ambaŭ okazoj, la finaĵo *o* ne estas almetata. Ĝi povas esti anstataŭata de apostrofo (') kiam ne estas memvidebla ke la nomo estas propra, ekzemple en la komenco de la parolado.

La celo de l' almovoj estas signata per la litero *u*, kun apostrofo antaŭiranta.

Gaston Moch,

eks-kapitano de artilerio (*Paris*).




Monda harmonio.

Amiko, estu filozofo
Kaj moku vi je turmentig',
Ĉar vivas energi kaj ŝtofo
En harmonia balanciĝ'.
Se al vi mankas taga pano,
Vi ĝin ne manĝas, sed, je Di'.
Por vi ĝin manĝas kunlandano,
Ĉar, kedu, perdas sin neni'.
Neniam dubu pri ekzisto
De harmonio kaj konstant':
Se maldikiĝas laboristo,
Dikiĝas ofte fabrikant'.
Se al vi mankas fianĉino,
Ne plendu, ŝi ekzistas kaj

Ŝi estas ies kromvirino,
Ŝi estas ies kora gaj'.
Ĉar, laŭ la monda harmonio,
Se al vi mankas por edzin'
Sufiĉa mono, jen alia
Por du virinoj havas ĝin.
Kaj se malklere vin influas
Trolaborado pro nutriĝ',
Por vi alia sin instruas,
Kaj konserviĝas balanciĝ'.
Ĉar ankaŭ estas la postulo
(Vi vin konsolu en la kor'),
Se vi montriĝas malklerulo,
Alia estas profesor'.

Amiko.



Malfermita letero al esperantistoj de ĉiuj landoj.

La libro, kolekto de versaĵoj, pri kiu estis parolita en la n:o 4 de nia gazeto, estas en farado. Bedaŭrinde mi ne havas sufiĉe da materialo por fini ĝin: mankas al mi pli ol duono da bezonataj lingvoj. Precipe malestas versaĵoj el lingvoj *araba, bosnia, bulgara, dana, esta, franca**, *fina, hispana, ĥorvata, itala, kroata, monto-nigra, persa, rumena, serba, slovaka, slovena, turka*.

La libro, kiu havos la nomon *Vocoj de popoloj*, enhavas 35—50 lingvojn, al kiuj apartenas la sekvantaj: angla, araba, armena, bohema, bosnia, bulgara, dana, esperanta, esta, fina, franca, germana (kun kelkaj ĝiaj dialektoj), greka, gruzia (georgia), hebrea, hinda, hispana, ĥina, ĥorvata, itala, japana,

*) Mi havas kelkajn proprajn librojn kun francaj versaĵoj, sed ili ne estas sufiĉe interesaj por esti tradukitaj.


kelta, kroata, latina, norvega, monto-nigra, persa, pola, portugala, rumena, rusa (kun la dialekto malgrand-rusa), serba, slovaka, slovena, sveda, turka, ungara k. c.)*

Multaj amikoj el Aŭstrujo, Germanujo, Portugalujo, Unuigitaj statoj, Rusujo k. c. havis jam la bonecon sendi al mi iliajn laborojn, sed tiuj ĉi estas ankoraŭ ne sufiĉaj por la dirata afero. Tial mi tre petas la esperantistojn de ĉiuj landoj kunlaboradi kun mi, sendante al mi iliajn *prozajn* tradukojn tiel kiel estas klarigita en la nro 4 de nia gazeto.***) Se *kelkaj* amikoj sendos al mi tradukojn el *unu* lingvo, tio ne malhelpos: mi povos fari elekton kaj prenos el la sendita la plej belajn versaĵojn, kaj ju plimulte da esperantistoj partoprenos en la farado de la libro, des pli gajnos la entreprenito. Por ĉiu lingvo estos deducita 300-400 linioj. Estas preferataj ne longaj versaĵoj, esprimantaj fortan senton, spriton, riĉan penson: estas dezirataj popolaj kantoj, romanoj k. c. (vidu la nro 4) el *diversaj* aŭtoroj.

Multe dankante la esperantistojn, kiuj jam faris siajn estimatajn sendojn al mi, mi tre petas la aliajn rapidigi la aferon per la bezonata helpo.

Kun saluto **A. Kofman.**

Rusujo, Odessa, Njeĵinskaja, d. N. 31.




Turmentigado.

Mi estas ĉiam fraŭlo, kaj kiam mi premenas
Kaj vidas geamantojn, mi forte min ĉagrenas:
Sendube mi ofendis per io la ĉielon,
Ke ĝi al mi ne donis ĝis nun fraŭlinon belan.

L' eterna fianĉeco min fine kolerigas,
La vido de geedzoj min malpacienigas:
Sendube mi ofendis la Patron bonakoran,
Ke Li ĝis nun formetis de mi l' edziĝohoron.

Mi estas ĉiam edzo, malbenas mi la sorton.
L' ekседziĝintoj vekas en mi envion fortan:
Kolere mi malbenas la tagon de naskiĝo;
Pro kio tiel longe ne venas l' ekседziĝo?

Amiko.



*) Tie ĉi estas nomitaj *ne ĉiuj* dezirataj lingvoj: se niaj amikoj scias ankau aliajn lingvojn ili faros tre bone, se ili sendos al mi tradukojn el ili.

**) Ĉar la *akcentoj* ne ĉiam montras la formojn, per kiu la versoj estas skribitaj, estus tre bone, se ĉiu versaĵo estus titolita per la shemo de la verskonstruo, ekzemple:

— — — — —
— — — — —
La nokto rapide la ombrojn delasis
Tra Alpa vilaĝo junulo trapasis

— — — — —
— — — — —
Spacon havas mi sen limo
Por kon struoj en a er'

Informejo de esperantistoj.

Verkoj pretaj aŭ sub laboro:

11. *La Biblio*. Kvinlibro de *Mozes* trad. de la odesa esperantistaro.
12. *Poltava*. poemo de *A. Puŝkin*. tradukata de *V. Devjatnin*.
13. *Ismail-Bej* de *M. Lermontov*, trad. de *V. Devjatnin*.
14. *Bela Azo*. rakonto de *N. Leskov*, tradukita de *M. S. Rakitski*.
15. *Figuro*. rakonto de *N. Leskov*. tradukita de *M. S. Rakitski*.
16. *Konsciencema Danilo*. rakonto de *N. Leskov*, tradukita de *M. S. Rakitski*.
17. *Voja Kolego*. rakonto de *P. Pejcerint*, tradukita de *M. S. Rakitski*.
18. *Reisebilder* de *H. Heine*, tradukata de *A. S. Kofman* kaj *V. Gernet*.
19. *Manfred* de lordo *Byron*. tradukata de *A. S. Kofman*.
20. *Mallonga instrukcio por ellerni lingvon internacian Esperanto*, por rusoj. Originala verko de *M. S. Rakitski*.

21. *Alfabetumo de lingvo internacia Esperanto*, por rusoj. Originala verko de *M. S. Rakitski*.


22. *Meza kortaro Esp.-sveda*. Nova eldono. Ellaboras *Paul Nylén*.

23. *Azulges*, rakonto de rusa verkisto *P. Zasodinski*, tradukis s-ro *Ŝirjaev*.

Al n-ro 3 aldono: "Evangelion de Marko" prete tradukis s-ro *Ŝirjaev* kaj komencis trad. "Evang. de Johano". La "Evangelion de Luko" tradukas s-ro *A. K. Zakrjævski* (Smolensk, Rusujo); la "Evangelion de Mateo", trad. s-ro pastro *K. O. Svanbom* (Knutby, Svedujo).

Agentoj de la lingvo Esperanto:

1. S-ro **Adolfo Serapio**. Hospitalillo. 9. *Santiago, Galicia, Hispanujo*.
2. S-ro **A. Zakrjævski**. Oficerskaja Sloboda, d. de Erdeli. *Smolensk, Rusujo*.
3. S-ro **I. Ŝirjaev**. Dom Spaso-Proboinskoj Cerkvi. kv. Porojkova, *Jaroslavl Rusujo*.



Adresaro de niaj abonantoj:

Svedujo:

18. S-ro **C. A. Lindén**, policisto, Döbelnsgat. 50, *Stockholm*.
19. S-ro **A. V. Magnusson**, policisto, Hölländaregat. 21 A, *Stockholm*.
501. S-ro **Vilh. Vahlström**, *Söderhamn*.
502. S-ro **Ernst Flensburg**, urbestro, *Ronneby*.
503. S-ro **Eugen Sörman**, *Frövi*.
504. D-ro **W. Ollander**, *Uppsala*.

Finlandujo:

505. S-ro **Aug. Th. Laurén**, apotekisto, *Kristinestad*.

506. S-rino **Selma Wisén**, Nylandsgat. 3. *Helsingfors*.

Austrujo:

507. S-ro **Rudolf Sperl**, Kk. Beamter. *Loeben*, Vorst. *Waasen* (Steiermark).

Hispanujo:

508. S-ro **Adolfo Serapio**, kuracisto. Hospitalillo 9. *Coroña, Santiago*.

Rusujo (Polujo):

509. S-ro **Raisa Kobilina**, poste restante. *Varsovio*.
510. **Al la legejo de la studentaro de l' universitato en Varsovio**.

